La Nov-Jorkia
ESPERANTISTO
ISSN 2573-6108

Esperantumado en la Imperia Ŝtato
Volumo 3 Numero 1 Majo 2019



Esperanto ĉe Universitato de Roĉestro

Timoteo Boronczyk, Esperanto-Societo de Sirakuso

Hoss Firooznia instruas lecionon pri Esperanto ĉe Universitato de Roĉestro (foto de Timoteo Boronczyk).

Depost longa paŭzo, denove okazas la esperanta kurso ĉe la Universitato de Roĉestro. La kurson instruas Hoss Firooznia ĉiulunde ĝis la fino de ĉi tiu printempa semestro.

Demandite kial li instruas la kurson ĉe la universitato, Hoss respondis, “Esperantujo ĉiam bezonas novajn parolantojn, kaj la lingvo reciproke riĉigas la vivojn de ties lernintoj. Tial mi ŝatas dividi ĝin kun scivolemaj, entuziasmaj novuloj—kaj universitato estas ideala loko por trovi tiajn homojn.”

Hoss unufoje instruis la kurson ĉe la Universitato de Roĉestro en 2005. Ĝi okazis preskaŭ ĉiujare ĝis 2013, kiam li tro okupiĝis pro laboro por instrui ĝin. Laŭtakse, inter 75 kaj 100 studantoj entute lernis bazan nivelon de Esperanto kaj pri esperanta kulturo per la kurso.

Ĉi-semestre sep lernantoj ĉeestis en la unua klaso. Tamen, kvankam studantoj ne ricevas akademian krediton por la kurso, kaj kutime kelkaj forlasas la kurson por turni sian atenton al siaj devigaj kursoj. Oni atendas, ke kvar restos dum la tuta lecionaro.

Mi ankaŭ demandis al Hoss, kion li deziras por la studentoj post la kurso. “Mia celo estas nur doni al ili ian bazon por plua esploro, ĉu en pli profunda studado, literaturo, kulturo, vojaĝado, trovi novajn amikojn, ks. Se ili sukcesos iel ajn utiligi la lingvon post la kurso, mi estos kontenta.”

Kolofono

La Nov-Jorkia Esperantisto raportas po du fojoj jare pri esperantaj eventoj kaj agadoj, kiuj okazas en la ŝtato Nov-Jorkio. Eldonas la gazeton la Esperanto-Societo de Sirakuso.

Redakcio
Timothy Boronczyk
Zerbie Hynson

Ne nepre kongruas la opinio de la societo kaj la enhavo de artikoloj. Sendu komentojn kaj proponojn retpoŝte al la redakcia teamo ĉe *novjorkio@syracuseesperanto.org.*

Aktuala kaj malaktualaj numeroj estas haveblaj senpage ĉe *syracuseesperanto.org/novjorkio.*

La kolofona bildo sur la unua paĝo montras la Broklinan Ponton, kiu estas unu el la plej malnovaj pendopontoj en Usono. Finkonstruita en 1883, ĝi konektas la novjorkajn kvartalojn de Manhatano kaj Broklino trapasante la riveron East. Pro ĉefa longo de 486,3 m, ĝi estis la plej longa pendoponto de la mondo je sia malfermo ĝis 1903, kaj la unua pendoponto kun ŝtalkabloj.

Interlingvistikaj Studoj en Poznano

Raúl J. García, Esperanto-Societo de Novjorko

En la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) denove renkontiĝis internacia grupo de studentoj por la programo de Interlingvistikaj Studoj. De la 2a ĝis la 9a de februaro 2019 venis dek studentoj por studi en la kvara el ses sesioj sub la gvido de Profesoro Ilona Koutny. La studentoj venas de Brazilo, Ĉinio, Francio, Germanio, Hispanio, Koreio, Rusio, kaj Usono.

Mi aŭdis pri la programo danke al Katalin Kovats en julio 2017, kiam mi ĉeestis en NASK. Mi ne estis tute certa ĉu mi povus dediĉi tri jarojn al studado de Esperanto, sed mi ne povis maltrafi la ŝancon ĉar tiutempe mia interesiĝo pri Esperanto rapide kreskis kaj mi timis, ke eble okazaĵoj de la vivo malhelpus mian partoprenon poste. Do, mi aliĝis kaj post sukcesa akcepto en la programon, nur du monatojn poste, mi flugis unuafoje al Pollando.

Ekde la komenco la sperto estis efika. La unua semajno en Pollando estis samtempe la lasta semajno de la antaŭa 3-jara programo, kiam okazis ankaŭ la 4-a Interlingvistika Simpozio en UAM do la afero estis granda okazaĵo. Mi tre ĝuis koni tiom da homoj samtempe, kaj aparte ĉar la grupo estis tre diversa. Ni multe lernis unu de la aliaj same kiel ni lernis de la oficiala programo.

Dum la jam okazintaj kvar sesioj ni lernis ne nur pri esperantaĵoj kiel gramatiko, kulturo, literaturo, kaj historio, sed ankaŭ pri ĝeneralaj lingvistikaĵoj kiel fonetiko, semantiko, morfologio, kaj komunikado. Por mi,

daŭrigo sur paĝo 4

Partoprenantoj studas dum la kvara sesio de la programo Interlingvistikaj Studoj ĉe Universitato Adam Mickiewicz (foto de Raúl J. García).

Esperantistoj de Roĉestro Voĉ-Rolas en Filmo

Tomaso Alexander, Esperanto-Klubo de Roĉestro

"Ĉu vi ŝatus fari rolon en nova filmo?" Mi ricevas multajn petojn pri Esperanto, sed tiu mesaĝo estis de Georgo Bakisto, kaj mi ĉiam diras "jes" kiam temas pri filmo de Christopher Mihm.

Christopher Mihm faras novajn filmojn en la stilo de scienc-fikciaj filmoj de la 50-aj jaroj. Georgo Bakisto organizas la dubladon de la filmoj en Esperanton. Jam dufoje mi partoprenis en la dublado, kaj mi ĉiam ĝuas la rezulton kaj fieras pri mia partopreno.

Georgo unue kontaktis min en 2014 pri la filmo *Danny Johnson Saves the World*. Temas pri infano, kiu kaptiĝas de eksterteranoj, eskapas, kaj ... savas la mondon. Georgo serĉis junajn voĉojn kiuj povas aktori en Esperanto. Ĉiuj el miaj infanoj havis rolon, kaj mi rolis kiel la eksterterano Steĉjo. Poste, mia filo Jonah kaj mi rolis en dublado de dua Mihm-filmo, *The Monster of Phantom Lake*.

Nun mi rolas en dublado de la plej nova filmo *Queen of Snakes*. En ĉi tiu filmo, mi rolas kiel vic-ŝerifo Hayes. Mia edzino kaj filino ankaŭ akceptis rolojn; Dana rolas kiel Sinjorino Davis, kaj Amelia rolas kiel Ethyl. Dana estis aparte ekcitita, ĉar ĝis nun ŝi ne partoprenis en la dublado de Mihm-filmo.

Georgo sendis al ni la tekston kaj ni legis ĝin. Ĉefe mi ne komentas pri la traduko, ĉar tio ne estas mia tasko. Ni simple legas ĝin diversmaniere kaj atendas komentojn—re-registras se necesas. Foje Georgo komentas pri kromaj sonoj, aŭ direktas "provu pli rapide", "pli sarkasme", ktp.. Foje venis kelkaj urĝaj petoj por novaj son-dosieroj antaŭ la limdato.

Sceno de *Queen of Snakes*, en kiu Tomaso Alexander voĉ-rolas kiel vic-ŝerifo Hayes (foto de la filmo).

Ĝis nun mi ankoraŭ ne scias la plenan historion de la fimo, kaj tial mi antaŭĝuas vidi ĝin, kiam ĝi finfine estos havebla.

Nova Esperanto-Klubo Formiĝis en Bufalo

Franzo Luglio, Esperanto-Klubo de Bufalo

Mi estas inĝeniero, kiu amas la multajn facetojn de Esperanto. Do, kiam Timoteo Boronczyk de Sirakuso petis mian helpon starigi esperantan klubon en Bufalo, mi konsentis. Kune, ni elektis lokon por la unua rekontiĝo kaj kreis paĝon en Meetup por reklami la grupon.

Mi estis nervoza pri la renkontiĝo; mi zorgis, ke eble neniu venos. Sed ja venis homoj, kaj mi ĝuis renkonti ĉiujn. La unuaj membroj estis diversaj pri siaj lingvo-niveloj, sed ĉiu estas egala partoprenanto. Ni diskutis protokolajn aferojn dum la unua renkontiĝo, sed mi atendas, ke ni planos agadojn kaj diskut-temojn por la venontaj renkontiĝoj.

La grupo havas bonan komencon, kaj mi kredas, ke ĝi kreskos kaj viglos. Se vi loĝas proksime al Bufalo, sentu vin bonvena kaj aliĝi al nia nova klubo!

Bufalaj klubanoj prezentas sin por foto (foto de Timoteo Boronczyk).

Ne Timu Paroli Esperanton

Jonathan SAUNDERS, Mohawk-Hudson Esperanto Club

La Mohawk-Hudson Esperanto Club kunvenas ĉiumonate ekde aŭgusto. Ni havas nur du membrojn, sed ni amuziĝas, kiam ni kunvenas. Ni iras al diversaj restoracioj, manĝas, kaj babilas.

En januaro, Timoteo (de Sirakuso) venis por nia sesa renkontiĝo. Kiam ni interparolis, proksima viro demandis al ni, "Ĉu vi parolas Esperanton?" Ni apenaŭ povas kredi tion, kion ni ĵus aŭdis! Hazarda nekonatulo ne nur aŭdis pri Esperanto, sed ankaŭ parolas ĝin!

Ni informis lin pri nia klubo, kaj eble li surprizos nin estonte per sia partopreno. Nu, neniam timu paroli Esperanton publike. Oni ne scias, kiu aŭskultas.

Inverlingvistikaj Studoj

daŭrigo de paĝo 2

kiu studis en universitato fakon tute ne rilatan al lingvoj, tiu programo estas vere interesa el la ĝenerala vidpunkto.

La plejparton de la laboro oni faras hejme, ĉar kompreneble, oni ĉeestas en Pollando nur unu semajnon kaj revenas hejmen. Malfacilas teni ekvilibron inter ĉiuj devigaĵoj en sia persona vivo, sia laboro, kaj la memstara studado distanca, tamen la sperto estas tre valora ĉar mi pli vastigas mian ĝeneralan konon, kaj rapide lernas pri Esperantujo de tre spertaj kaj longtempaj Esperantistoj.

En septembro 2019 komenciĝos la fina jaro de la 3-jara programo, kiam samtempe komenciĝos 1-jara studado pri instruado de Esperanto, gvidata de la profesoro Katalin KOVATS. Por informoj pri ĝi vidu la retpaĝon ĉe *edukado.net/novajhoj ?id=784*.

Kluboj

Binghamton Esperanto
facebook.com/groups/551200958567378
estro Kelly BUNMAN
tehkellymonster@gmail.com

Esperanto-Klubo de Bufalo
meetup.com/Buffalo-Esperanto-Club
estro Franzo LUGLIO

Esperanto-Societo de Novjorko
esperanto-nyc.org
estro Raúl J. García
esperantosocietyofnewyork@gmail.com

Esperanto-Klubo de Roĉestro
groups.yahoo.com/EsperantoRochester
estro Tomaso ALEXANDER
salivanto@yahoo.com

Mohawk-Hudson Esperanto Club
estroj Phyllis CLARK kaj Jonathan SAUNDERS
mhesperanto.org

Esperanto-Societo de Sirakuso
syracuseesperanto.org
estro Timoteo BORONCZYK
mail@syracuseesperanto.org

Se ne estas grupo en via regiono, starigu iun kaj sciigu nin. Ni nepre listigos ĝin ĉi tie.

Kalendaro

Renkontiĝo de Binghamton Esperanto okazas preskaŭ ĉiusemajne ĉe Starbucks (Front St). Datoj estas anoncotaj.
facebook.com/groups/551200958567378

Renkontiĝo de la Esperanto-Klubo de Bufalo okazas ĉiumonate la unuan sabaton. Lokoj estas anoncotaj.
meetup.com/Buffalo-Esperanto-Club

Komencanta konversacia renkontiĝo de la Esperanto-Societo de Novjorko okazas foje ĉe Panera Bread (Union Sq). Datoj estas anoncotaj.
meetup.com/EsperantoSocietyOf NewYork

Renkontiĝo de la Mohawk-Hudson Esperanto Club okazas ĉiumonate la duan ĵaudon.
meetup.com/Mohawk-Hudson-Esperanto-Club

Renkontiĝo de la Esperanto-Klubo de Roĉestro okazas ĉiumonate la duan vendredon ĉe Starbucks (Center Pl Dr).
events.duolingo.com/rochester-esperanto

Formala renkontiĝo de la Esperanto-Societo de Novjorko okazas ĉiumonate la trian vendredon (krom somere) ĉe Community Church, 28 East 35th St.
meetup.com/EsperantoSocietyOfNewYork

Renkontiĝo de la Esperanto-Societo de Sirakuso okazas ĉiumonate la trian vendredon ĉe Strong Hearts Cafe.
meetup.com/SyracuseEsperanto

Paralela Universo okazos la 17an de aŭgusto.
facebook.com/groups/691599730978382

Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto okazos la 12an ĝis la 14a de oktobro.
are-esperanto.org